

ĈEA-Retkomunikoj 2018/01

Estimata leganto,

permesu al ni saluti vin la unuan fojon en jaro 2018. En la numero ni ŝatus informi vin pri plej proksimaj eventoj, sed ankaŭ pri interesaj multmediaj novaĵoj kaj pri unu grava informo rilate al Esperanto-Muzeo en Svitavy. Do, agrablan legadon!



Multmediaj novaĵoj

1. Aktualajoj en la ĈEA-retejoj

1.1 Esperanto.cz - Ĉeĥlingvaj artikoloj

[O esperantu v českých a slovenských médiích na přelomu 2017/2018](#)

Pri Esperanto en la ĉeĥaj kaj slovakaj amaskomunikiloj dum jarŝanĝo 2017/2018

1.2 Esperanto.cz - Esperantlingvaj artikoloj

[Petr Ginz iĝus 90jara](#)

La 1-an de februaro 1928 naskiĝis Petr Ginz, ĉeĥa (laŭ la patro juddevena) multflanke elstare talentita knabo kaj denaska esperantisto, kies desegnaĵo „La Tero vidata de sur la Luno“, fluginta kosmen, fariĝis la internacia simbolo de holokaŭsto. Kiel 16jara li mortis en la koncentrejo en Aŭŝvico. Okaze de lia neĝisvivita 90jara jubileo ni rememoru lian neordinaran vivon kaj admirindan personecon kaj malkovru liajn verkojn pere de Esperanto. Ne mankos ligiloj al videoj kaj al liaj muzikigitaj poemoj.



[Videoregistraĵoj el ARKONES](#)

Unu el la plej prestiĝaj kaj plej vizitindaj kulturaj Esperanto-aranĝoj fariĝis sendube ARKONES – Artaj Konfrontoj, okazantaj ĉiuseptembre en la pola urbo Poznano. Por subteni la internaciajn kontaktojn de la ĈEA-membraro, alirebligi al niaj legantoj valoran enhavon de la aranĝo kaj instigi al persona partopreno, ni partumas kun vi plurajn interesajn videojn el ĝia programo el 2016 kaj 2017.

[Tri aktualajoj ne nur de TEJO](#)

Ni ŝatus informi vin per tiu ĉi teksto pri tri aktualajoj, kiujn vi ne devus mistrafi ;-). Kio nuntempe okazas en esperantujo? Legu pli!

[Kia estis la 9-a Junulara E-Semajno en Ŝĉecino?](#)

De la 26-a de decembro 2017 ĝis la 2-a de januaro 2018 okazis en Ŝĉecino, do en havena urbo en norda Pollando, la 9-a Junulara E-Semajno. Partoprenis ĝin 242 partoprenantoj el 30 landoj. Aranĝon apogis Olgierd Geblewicz, marŝalo de la Okcidentpomerania Vojevodio kaj Teresa Kalina, prezidantino de la Okcidentpomerania Sejmeco. De tiu ĉi aranĝo ni ofertas al vi kelkajn interesaĵojn, ĉar la aranĝon partoprenis ankaŭ junaj ĉeĥaj esperantistoj ...



Daŭre aktualas ...

[Subtenu malriĉajn infanojn en Afriko](#)

En tempo ne nur antaŭ Kristnasko ni volas aĉeti donacojn por niaj geamikoj, familianoj, proksimuloj ktp ... Sed eble ne al ĉiu persono nepre devas plaĉi tiu vivo en konsuma stilo, konsuma societo. Kaj tiuj personoj prefere ŝatus fari ion bonan por malriĉaj homoj. Ni ŝatus en tiu ĉi aktualaĵo informi vin pri du eblaj projektoj.



1.3 Muzeum.esperanto.cz

[Zemřel donátor muzea Alois Jakubec](#) (Forpasis la muzea donacinto Alois Jakubec)

[Muzea kalendaro por 2018 elŝuteblas](#)

[FOTOGALERIO Ekstermuzeaj ekspozicioj](#) - Ankaŭ dum periodo de la rekonstruo de nia muzeo la Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA ne mallaboras. Ni invitas vin perfote al tri ekspozicioj, pretigitaj jarŝanĝe de 2017/2018 en Písek, Havířov kaj Hodonín.

2. Muzea paĝo ĉe Ipernity

Pli ol 2000 multmediaj dosieroj en 55 albumoj

[La lulkanton "Dormu, ho mia princet"](#) kantas en la praga teatro SEMAFOR

Jolana Haan Smyčková

[Artikolo 10 jaroj depost forpaso de Claude Piron \(1931-2008\)](#) -

entenas ligilojn al la video kun li, lia libro "La bona lingvo", brila prelego el Bulonjo, konata kanto Fromaĝ' el Edamo en lia interpreto kaj precipe al la retejo kun multaj liaj libere elŝuteblaj multmediaj verkoj. Ni aparte bonvenigas vin esplori la verkaron de tiu ĉi neforgesinda persono!



3. Novaj sonartikoloj de la [Esperanta Retradio](#)

Ĉiutage aperas nova kelkminuta programo pri iu interesa temo, kun paralela teksto por pli bona kompreno!

Novaj registraĵoj de Jaroslava Malá:

1. [Sep tagojn pli por edzino kaj infano](#)
2. [Nekomprenema leonido](#)
3. [Nova vivoŝanco per artefarita koro](#)
4. [La ateisto](#)
5. [Universitato de la tria aĝo](#)
6. [Ĉeĥoj dubas pri ĝenerala malpermeso de fumado](#)
7. [Pupoj por bona celo](#)



4. Novaj elŝuteblaj prelegoj de la membroj de la Esperantista Klubo en Brno

[Tabako kaj ĝiaj fidelaj sklavoj - Oldřich Arnošt Fischer](#) - 17.1.2018

[Je via sano! – Ĉu vere je mia sano? - Oldřich Arnošt Fischer](#) - 7.2.2018

[Mia konatiĝo kun spiriteco – František Horáček](#) - 21.2.2018

5. Novaĵoj de Verda Stacio

Inter septembro 2017 kaj februaro 2018 en la Urba Biblioteko okazis lingvokurso de Esperanto por komencantoj, al kiu aliĝis 17 personoj kaj finis ĝin sukcese 10 personoj. Sinceran gratulon!

La videoraporton el la lasta leciono kaj transdono de la diplomoj, okazintan 22.2.2018, kiun partoprenis ankaŭ gastoj el la pola urbo Gliwice, vi povas vidi [en nova video ĉe YouTube](#).

La jutuba kanalo [11pably, kreita de Pavol Kaščák el Verda Stacio](#) entenas entute 161 videojn kaj havas i.a. 380 regulajn abonantojn en diversaj landoj kaj milojn da vizitoj.


6. Nova traduko de Jindřiška Drahotová senpage elŝuteblas

La riportlibro de la finna esperantisto Kalle Kniivilä - "*IDOJ DE LA IMPERIO - La rusoj en Baltio*", kiun li eldonis kune kun la usona eldonejo Mondial en 2016, estis ĵus fintradukita far Jindřiška Drahotová al la ĉeĥa lingvo. La libro temas pri rusoj kiuj vivas en la baltaj landoj kaj pri iliaj komplikaj rilatoj kun litovoj, latvoj kaj estonoj. La anotacion legu [ĉi-tie](#).

La libro aperis inter la 26 plej bone aprezitaj libroj de la jaro (vidu artikolon en "[Libera folio](#)"). La ĉeĥa traduko elŝuteblas en <http://esperanto.wz.cz/Potomci.pdf>. En la paĝaro [Esperanto.wz.cz](#) senpage disponeblas ankaŭ aliaj ŝiaj librotradukoj kaj popularaj Legolibretoj. Ne hezitu ilin uzi por via kleriĝado kaj amuziĝo! Aparte rekomendindas pli novaĵo - spritaj AFORISMOJ de Jan Sobotka (ĉeĥlingvaj, kun paralela traduko al Esperanto): <http://esperanto.wz.cz/AFORISMY.pdf>.

Esperanto-Muzeo en Svitavy DENOVE malfermitas

Post la rekonstrulaboroj en la Ottendorfer-Domo la muzeo estas denove remalfermita dank al granda laboro de la Klubo de Amikoj de Esperanto en Svitavy! Ni kore invitas vin denove reviziti la muzeon kaj vidi la ekspozicion "Homo kontraŭ Babelo"! Informojn pri malfermhoroj vidu [en la paĝo de la muzeo](#). Se vi deziras komentitan trarigardon en Esperanto, bonvolu anticipi anonci vin ĉe muzeo@esperanto.cz.



Esperanto-Muzeo post la rekonstrulaboroj

Alinomigo de la biblioteko kaj senŝualigo de memortabulo en Vrdu

Dimanĉon, la 8-an de julio, je la 14-a horo, la urba biblioteko en Vrdu apud urbo Čáslav fariĝos la biblioteko de Francisco Valdomiro Lorenz. Samtempe estos senŝualigita memortabulo de Francisco Valdomiro Lorenz. La memortabulo estos kreita de esperantisto Zdeněk Myslivec.

El nia historio

La 10-an de januaro antaŭ 140 jaroj naskiĝis la nestoro de Esperanto en ĉeĥaj landoj Teodoro Ĉejka. Bv. konatiĝi kun lia admirinda vivo kaj laboro:

[Panelo pri Teodoro Ĉejka en la muzea ekspozicio](#)

[Bohema esperantisto 1902-1](#)

Vidu kaj legu, kiel aspektis la unua numero de la unua esperanta gazeto sur la teritorio de Ĉeĥio, fondita kaj redaktita de T. Ĉejka

Oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

kreskas!

Jam preskaŭ sep monatojn funkcias oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Celo de la paĝaro estas informi vin pri novaĵoj de la esperanta movado en Ĉeĥio kaj en la mondo. La redakcia teamo klopodas preskaŭ ĉiun tagon oferti ion interesan! [Sekvu nin ĉe Facebook!](#) Ne forgesu ankaŭ vizitadi [la paĝon de Esperanto-Muzeo](#). Dank al viaj ŝatklakoj kaj komentarioj informojn vidos pli da homoj.

Eventoj

Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos en Ĉeĥio:

Katolika meso en Esperanto jam baldaŭ en Prago!

Esperanta meso okazos en Prago 4, [en la preĝejo de Sankta Pankraco](#) la 28-an de februaro 2018 je la 17-a horo. Celebros Max Kašparů, la esperantan tekston interpretos ĉeĥe Pavol Petrik. Kun orgena akompano kantos Jolana Haan Smyčková, aktorino kaj kantistino de la praga teatro Semafor, filino de nia karmemora Miroslav Smyčka, kaj ŝia edzo Richard Haan,opersolisto de Nacia Teatro. Per orgeno akompanos ilin membro de la orkestro de Semafor Jiří Jan Nepomuk Svoboda.

El la ĉefa stacidomo vi povas veturi per metroo, metrolinio C, al la stacio Pražského povstání (Praga insurekcia ribelo), daŭrigu piede preter Komerca Banko al la preĝejo de Sankta Pankraco.

Ankaŭ interesatoj el la vicoj de neesperantistoj estos bonvenigataj!



Max Kašparů dum la meso

Migra ekspozicio "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" ĝis la 4-a de marto en oranĝerio de la banloko Hodonín

Utiligu supozeble la lastan tagon, kiam eblos senpage vidi la projekton en Moravio (vidu adreson kaj situon [surmape](#))!

Por interesitoj eblas dimanĉe 4.3. pretigi komentitan trarigardon, projekciadon de mallongaj filmoj en Esperanto kaj Esperanto-babiladon en la kafejo. La viziton eblas ev. kunligi kun banado en Wellness la Taga banloko (detalajn informojn vidu en <http://www.laznehodonin.cz/denni-lazne> - enirprezo por 2 horoj estas 180,- CZK).

Kaze de intereso veni bv. NEPRE antaŭanonci sin al Josef Vojáček, jvojesp@gmail.com!

Buso el la busa stacidomo Hodonín ekiras je 14:30 kaj venas al la banloko je 14:36, buso el la mala direkto el Kyjov (tra Ratíškovice) ekiras jam je 12:46 kaj venas al la banloko je 13:25. Volontuloj ev. povas helpi dum la malinstalado.

Fotaĵoj el la inaŭĝuro de la ekspozicio spekteblas [en la tria parto de la albumo](#).

13-15/04: 13-a BIERo

[Brila Internacia Esperanta Renkontiĝo](#) en Třeboň - organizas klubo E-mental'.

27/04-01/05: 5-a Centrejo

[Printempa renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo](#) en Žďár nad Sázavou.

02-06/05: La 47-a Lingva Seminario

[Semajnfina seminario](#) en familieca pensiono ESPERO, kiu troviĝas en pitoreska okcidenta parto de sabloŝtona Bohemia Paradizo (norde de Prago), plena de divesspecaj turismaj allogaĵoj (kulturaj kaj naturaj).

04-06/05: Renkontiĝo de la ĉeĥa IKUE-sekcio

La ĉeĥa IKUE-sekcio kaj Katolika sekcio de ĈEA invitas ne nur siajn membrojn, sed ankaŭ ĉiujn favorantojn al [maja renkontiĝo](#) por komune travivi belajn tagojn en la belega surmonta moravia pilgrimloko Svatý Hostýn – Sankta Hostýn, Ĉeĥio (landparto Moravio).

19/05: 35 jaroj de EK Benešov

Esperanta klubo Benešov festas sian [35-jaran datrevenon](#). Nuntempaj klubanoj invitas ĉiujn anojn de la klubo kaj ĉiujn esperantistojn.

[Se vi volas scii pli pri aliaj eventoj, vizitu nian paĝon](#) aŭ ankaŭ retejon

[Eventoj.hu](#) - internacian kalendaron de Esperanto-aranĝoj! Volonte sendu ankaŭ viajn proponojn!

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikojn? Skribu al retkomunikoj@esperanto.cz!